

42 Faka agado

Esperanto en Rotary International

Ursula Grattapaglia

Kiam, antaŭ jaroj, la Esperanto-movado rekomendis al siaj membroj eniri neesperantistajn mediojn, precipe NRO-ojn, por proponi Esperanton kiel solvon de ilia lingva problemo, la aktivuloj de RADE (Rotaria Amikaro De Esperanto), fondita en 1928 kiel unua fak-asocio de *Rotary*, decidis agadi favore al Esperanto en la medio de *Rotary International* (Rotario Internacia). Kial *Rotary* kaj ne alia el la miloj da NRO-oj en la mondo? Ni perceptis, ke la etikaj valoroj de tiu movado tre similas al tiuj de la Esperanto-movado, kiel oni facile povas konstati legante ĝiajn celojn:

“*Rotary International* konsideras sin “internacia organizaĵo de profesiuloj viviĝantaj per etikaj valoroj, kun la idealo volontule servi, per komunaj projektoj kaj internaciaj programoj, la mondan komunumon por antaŭenigi pacon kaj interkomprenon inter la nacioj.”

Kaj ne nur tio, sed ankaŭ: “La forto de *Rotary* devenas de la fakto, ke ĝi estas internacia, sendependa movado, nepolitika, nereligia, respektanta ĉies pensliberecon kaj kulturon, sed ligita per samaj idealoj de por-paca agado, respekto kaj Interkompreno kaj la konkreta realigo de tutmondaj programoj en la kampo de edukado kaj humanaj projektoj”.

Komence la rotarianoj-esperantistoj klopodis “desupre”, proponante dufoje sinsekve, rezolucion pri Esperanto ĉe la Leĝofara Konsilantaro de *Rotary*. Kvankan tiu Rezolucio estis aprobita de sesdeko da Rotariaj Distriktoj, ĝi ne sukcesis skui la intereson de la plimulto de pli ol 500 Distriktoj, kiuj konsistigas la universon de *Rotary* tutmonde kun 35 500 tradiciaj lokaj kluboj kaj pli ol miliono da membroj.

Tial oni devis ŝanĝi la agadon kaj labori de malsupre, disvastigante Esperanton, kiam eblis en la kluboj. El tiu agado en 2014 konkrete rezultis la fondo-akto de la unua Rotaria Klubo en la mondo, ligita al itala Distrikto, kiu uzas nur Esperanton dum siaj elektronikaj rilatoj inter siaj membroj loĝantaj dise tra la mondo kaj tamen realigantaj humanajn projektojn. Ĉiukaze jam ekzistas rotarianoj en tradiciaj kluboj, kiuj uzas Esperanton, sen tamen aparteni al specife esperantista rotaria Klubo. Nun en 2017, danke al la favora sinteno de samideano João Otavio Veiga, Guberniestro de Rotaria Distrikto en Brazilo, ni sukcesis fondi la duan Rotarian Klubon en la mondo kies membroj, loĝantaj en kvar kontinentoj, uzas nur Esperanton dum siaj semajnaj vidkonferencoj kaj retkontaktoj.

Sub la titolo *Brazila Klubo, kiu uzas alian lingvon*, la oficiala revuo *Rotary Brasil* eldonis en novembro 2017 favoran artikolon pri la fondo de la nova Klubo, per tio kreante sendube intereson pri Esperanto inter la pli ol 54 000 brazilaj rotarianoj, kiuj legis la ĉi-jaran sloganon “Rotary faras la diferencon” en tiu *alia lingvo*.

Nia agado daŭras. La potencialo de pliaj esperantistaj rotarianoj estas granda kaj la uzo de Esperanto jam montriĝis valida elemento por solvi parte la lingvan problemon de *Rotary International*, kiu ne povas ignori ĝian modelan funkciadon en internaciaj humanecaj programoj kaj dum Rotariaj tutmondaj kongresoj.

Se esperantistoj, legante ĉi tekston, havas intereson esti volontuloj en *Rotary*, bonvole skribu al Giuseppe Grattapaglia (grattapagliabeppe@gmail.com).